Por ebligi la nacinivelan aprobon de la sciencistaj gradoj agnoskitaj de AIS la prezidanto dekretis ekzamenregularon kaj publikigis ĝin en grkg/H. 1988/1. La Senato ĝin provizore aprobas, sed decidas ĝin proponi al la Ĝenerala Asembleo kun la jenaj ŝanĝoj:

(1) Oni enprenu en la unuecigitan ekzamenregularon la ankoraŭ validajn erojn de la docentiĝregularo, tiel ke ĝi ne nur enhavu la kondiĉojn por la akiro de la habilitdoktoreco kiel sciencista grado, sed ankaŭ la kondiĉojn por la akiro de la (normale al ĝi ligita) instrurajto („venia legendi"), t.e. de la akiro de la rangotitolo „plenrajta docento" konforme al la alvokoregularo.

(2) Oni aldonu al artikoloj 8.2 kaj 8.3 la jenan alineon, kiu ekvalidu tuj:
„La ekzamenoficejo rajtas decidi eventuale rezigni pri ekzameno en kromfako, se la koncernaj kapabloj kaj meritoj de la kandidato jam alikiale estas evidentaj."

(3) Krom artikolo 16.1 estu prezentotaj al la ĜA ankaŭ du variantoj:
(a) „ Buŝa ekzamenparto okazas publike, se ne la kandidato mem deziras nepublikecon."
(b) „Buŝa ekzamenparto okazas publike aŭ nepublike laŭ la antaŭa decido de la kandidato."

(4) Cele harmoniigon kun la kotizregularo en la lasta alineo de artikolo 12.4 estu tuj postulataj 8 anstataŭ 5 internaciaj respondkuponoj.

(5) Pro la akceptita formo de la kotizregularo estu tuj pliprecizigite en artikolo 12.2 same kiel en art. 21.3: „... laŭ la apendica kotizlisto de la kotizregularo.".

(Interrompo de la kunsido: 12:30 h. Rekomenco - post disa trastudado de la dosieroj de novaj ISKanoj - : 18:45 h)

7. (Novaj alvokoj)

Konforme al la alvokoregularo OProf.Popovic skribe estas proponinta nomumi AProf.Schick orda profesoro en la sekcio 3. La prezidanto informas, ke kolego Schick intencas adapte adoptigi sian doktorecan titolon kaj krome verki libreton en ILo. La Senato akceptas la proponon de OProf.Popovic.

La prezidanto proponas akcepti la universitatan profesoron Schrader el Paderborn kiel novan subtenan membron kaj nomumi lin ASci. en la sekcio 6. La Senato tion aprobas.

La senatanoj Pancer, Pennacchietti kaj Popovic prezentas listojn de ĉiuj novaj ISKanoj, kiuj plenumas jam la kondiĉojn esti alvokataj almenaŭ kiel ASci. Oni decidas senescepte akcepti ilin ĉiujn, petas la prezidantan sekretariejon informiĝi, ĉu eventuale en kelkaj kazoj eĉ la alvoko al pli alta aparteneckategorio estas plenumita, kaj rajtigas la prezidanton en tiaj kazoj je konforma alvoko. Oni opinias ke estas dezirinde, ke la prezidanto instigu per individuaj leteroj tiujn ISKanojn, kiuj probable povus plenumi la kondiĉojn de pli alta aparteneckatekorio, havigi la necesajn certigajn dokumentojn aŭ laŭeble baldaŭ plenumi ĉi tiujn kondiĉojn.

(Interrompo: 19:45 h. Rekomenco: ĵaŭdon, 1988-03-31, 9:15 h. La antaŭan vesperon interkonsiliĝis trezoristo OProf.Popovic kun I.U. Frank pri la librotenado, la kalkulado de la enkaj elspezoj kaj la bilanco 1987. Dume la direktoro de la ekzamenoficejo OProf.Pancer pritraktis kun la prezidanto la kompletigindajn studlibrojn.)

8.(Diversaĵoj)

Trezoristo OProf.Popovic raportas pri la librotenado kaj la financa raporto faritaj por 1987 en la prezidanta sekretariejo. Li interkonsiliĝos samtage kun la trezoristino de la SubS, Marina Michelotti prof. HMdAIS, por ke la bilanco en la internacie kutima formo (respektata i.a. en FRGermanio kaj en Jugoslavio) estu preta en la unua semajno de aprilo. (De la sanmarina registaro ne estis alveninta oficiala sciigo, ke en San Marino estas deviga speciala formo de la financa raporto, diferenca de internaciaj kutimoj.)

La direktoro de la ekzamenoficejo, OProf. Pancer, kaj la prezidanto raportas pri la finpritraktado de la reekzamenoj okazintaj antaŭ la oficialiĝo de la regularoj. Oni aprobas la striktan aplikadon de artikolo 4.2 de la ekzamenregularo kaj precipe severan kontrolon de la plenumiteco de la necesaj studoj ĉe agnoskitaj universitatnivelaj institucioj laŭ art. 7 de la regularo pri instruado kaj studado. Oni tiel celas minimumigi la riskon, ke sciencista grado agnoskita de AIS kaj apogita per la finatesto en la atestaro estus malagnoskota en la hejmlando de la koncerna sciencisto.

La prezidanto dankas la senatanojn pro la zorgema pritrakto de la ampleksa laboro kaj fermas la senatkunsidon je 9:45 h.

OProf.Pancer dr. — *Senata Sekretario*

OProf.Dr.Frank — *Prezidanto*

„Novaj" AISanoj: Ĝustigo

La Oficialaj Sciigoj de 1988-03-19 (vd. GrKG/Humankybernetik 29/1, pj. 38 sj.) la titoloj de la aktualigitaj adreslistoj estas eraraj. Ne temas ĉiam pri „novaj" MdAIS, AMdAIS aŭ AdAIS, sed kelkfoje nur pri novaj adresoj (ekz. de OProf.Pancer) aŭ pri rangoplialtigoj. La titoloj devintus esti „Aktualigo de la ...-listo".

Honorregularo de AIS

Artikolo 1: Ĝeneralaĵoj

1.1 La aparteneco al Sektoro de AIS aŭ jam la nura enlistigiteco en la registron de la internacilingvaj sciencistoj konataj flanke de AIS (ISK, Internacia Scienca Kolegio) estas honoro kaj ne havigas materian profiton; male, ĝi postulas oferemon tempan kaj materian. La funkiado de la Akademio dependas tial de la respekto montrita honorige la meritojn pri la plua progreso de la scienco, tekniko kaj arto, kaj pri la efika plenumo de la taskoj de la Akademio. La instiga efiko de honorigo dependas krom de ties reliefigo ankaŭ de ĝia meritkonforma gradigo per diversaj aparteneckategorioj, rolotitoloj, rangotitoloj, premioj kaj aliaj distingiloj.

1.2 Rilate la respektespriman reliefigon de honorigoj atribuitaj aŭ oficiale agnoskitaj flanke de AIS la Akademio ne restu sub la nivelo de ajna lando en kiu ĝi havas apartenantojn.

1.3 Por akirigi al siaj apartenantoj la respekton ankaŭ de ekster la Akademio, necesas ke la Akademio mem sin prezentu digne. Precipe dum la solenaĵoj gravas deca sinteno kaj vestiteco de la tuta apartenantaro.

Artikolo 2: Mencio en la Internacia Sciencista Dokumentaro

2.1 La Akademio flegadas datumbankon de ĉiuj ISKanoj kaj subtenaj membroj; ĝi disponigas (en presita aŭ aŭtomate pritraktebla formo) eltiron de ĉi tiu datumaro kiel publike alirebla registro (ISD), en kiu estas - krom la dokumentonumero - mencienda de ĉiuj ISKanoj kaj (se ili men ne malpermesas tion) de ĉiuj subtenaj membroj ne apartenantaj samtempe al ISK la nomo, adreso, sciencistaj gradoj agnoskitaj de AIS, rango- kaj rolotitoloj ĉe AIS kaj la aparteneckategorio (inkluzive la fakon kaj la fakarindikon). La kromaj informeroj petitaj kaj-donitaj per la pripersona informilo aperas en la registro (tiom kiom la koncernatoj tion ne malpermesas) nur de la honoraj membroj, de la adjunktaj apartenantoj kaj de la efektivaj membroj de AIS en amplekso same limigita por ĉiuj. (Vd. art. 10.1 de la regularo pri rajtoj, devoj kaj alvoko.)

2.2 Restu en la registro nekrologe la mencioj
- de mortintaj plenrajtaj membroj (MdAIS) 20 jarojn,
- de mortintaj asociitaj membroj (AMdAIS) 10 jarojn,
- de mortintaj adjunktoj (AdAIS) 5 jarojn,
- de aliaj mortintoj 2 jarojn

post la jaro de la morto. Anstataŭ la adreso estu sciigita en la registro la datoj kaj lokoj de la naskiĝo kaj de la morto.

2.3 La mencioj de ĉiuj, kiuj deklaras eksiĝon el AIS aŭ estas eksigitaj estu nuligataj je la proksima okazo.

Artikolo 3: Akademia vestaĵo

3.1 En la koloroj blua kaj blanka la Akademio difinas la jenajn akademiajn vesterojn: kravaton, skarpon, talaron kaj diversajn kapvestaĵojn (bireton kaj doktoreckĉapelon).

3.2 La bluan kravaton kun blanka enskribo „AIS" rajtas ajnokaze surhavi ĉiu ISKano, subtena membro aŭ partoprenanto de SUS aŭ de aliaj kursoj aŭ konferencoj okazigitaj de AIS. Apartenantoj de la scienca sektoro de AIS surhavu minimume la AIS-kravaton almenaŭ dum la solenaĵoj de AIS.

3.3 La skarpon de AIS surhavu dum solenaĵoj la subtenaj membroj kaj la honoraj membroj de la Subtena Sektoro.

3.4 Rajtas surhavi (kaj dum solenaĵoj de AIS laŭeble surhavu) la talaron de AIS ĉiuj apartenantoj de la Scienca Sektoro (inkluzive de ties honoraj membroj) same kiel ĉiu sciencisto al kiu AIS agnoskis (originale, per adapta adopto aŭ honorkaŭze) sciencistan gradon. En la supra parto maldekstra poŝo rolas kiel distingilo:

1) Ĉe senatanoj la poŝo estas blua-blanka kun blua enskribo „AIS".

2) Ĉe la aliaj plenrajtaj membroj (OProf., MdAIS) la poŝo estas blua-blanka kaj havas bluan indikon de la sekcio (K,H,S,F,N,M).

3) Ĉe la asociitaj profesoroj (AProf) la poŝo estas blua en blua-blanka enkadriĝo; la poŝo surhavas blankan indikon de la sekcio.

4) Ĉe la plenrajtaj docentoj (PDoc) la poŝo estas blua, sen enkadriĝo, kaj surhavas blankan sekciindikon.

5) Ĉe la asociitaj docentoj (ADoc), kiuj ne havas pli altan rangon en alia sekcio, la poŝo estas blanka en blua-blanka enkadriĝo kaj surhavas bluan sekciindikon.

6) Ĉe la adjuntoj sciencaj (ASci), kiuj ne havas pli altan rangon en alia sekcio, la poŝo estas blanka sen enkadriĝo kaj surhavas bluan sekciindikon.

7) Ĉe la sciencistoj, al kiuj AIS agnokis sciencistan gradon, sed kiuj ne jam apartenas al la scienca sektoro (sed nur al ISK), la poŝo estas blanka, sen enkadriĝo kaj sen sekciindiko.

8) Kaze de honorkaŭza aparteneco estas aldonita al la distingilo de ordaj profesoroj cirklo ĉirkaŭ „AIS" (kazo de honoraj senatanoj) aŭ ĉirkaŭ la sekciindika majusklo (honoraj membroj de sekcio) aŭ nura cirklo sen enhavo (kazo de honoraj membroj de la scienca sektoro de AIS ĝenerale).

9) Kaze de honorkaŭza titoligo blua cirklo troviĝas sur la blanka poŝo, ĝis kiam la honorigito eventuale fariĝas efektiva membro; tiam la cirklo ne estu transprenata al la nova poŝo.

3.4 Kiu sukcese ekzameniĝis ĉe AIS por akiri la agnoskon de unu el la kvar sciencistaj gradoj aŭ la rajtojn de plenrajta docento, same kiel tiuj, kiuj akiris honorkaŭze sciencistan gradon ĉe AIS, rajtas porti (kaj dum solenaj aranĝoj de AIS laŭeble portu) la oficialan kapvestaĵon.

1) Ĉe doktoroj habilitaj la kapvestaĵo estas blua ĉapelo kun blanka ŝnuro maldekstre dependanta. Eventuala blanka rubendo ĉirkaŭ la ĉapelo indikas la akiritecon de la plenaj docentaj rajtoj (venia legendi).

2) Ĉe aliaj doktoroj kaj plenrajtaj docentoj la kapvestaĵo estas blua ĉapelo kun samkolora ŝnuro maldekstre dependanta. Ĉe plenrajtaj docentoj aldoniĝas blanka rubendo.

3) Ĉe aliaj magistroj la kapvestaĵo estas blanka bireto.

40 Ĉe aliaj bakalaŭroj la kapvestĵo estas blua bireto.

3.5 La envestigo de nove alvokitaj membroj, asociitaj membroj kaj adjunktoj same kiel de sukcesintaj ekzamenkandidatoj okazu prefere dum solena inaŭguro aŭ fermo de SUS post la transdono de la koncerna dokumento.

Artikolo 4: Uzado de titoloj kaj sciencistaj gradoj

4.1 En la Internacia Sciencista Dokumentaro (ISD) - t.e. la registro de la internacilingvaj sciencistoj konataj flanke de AIS (ISK de AIS) - antaŭiras, majuskle skribite, la nomon

1) la (eventuala) rangotitolo - kaze de plureco: en malkreskanta rango-ordo (OProf - AProf - PDoc - ADoc - ASci) - kaj poste

2) la (eventuala) sciencista grado agnoskita de AIS (kaze de plureco: en kreskanta nivelo-ordo (Bac. - Mag. - Dr. - Dr. ... habil.).

Aliaj sciencistaj titoloj aŭ rangindikoj povas sekvi minuskle skribite la nomon laŭ la informoj de la koncernato. Por eltiroj de la registro kaj precipe por la vortigo de la adreso sur sendaĵo de AIS al ISKano la titolaro estu mallongigita (forigante la malpli gravajn titolojn aŭ titolerojn) se tio konvenas ekz. pro limigita spaco.

4.2 Efektivaj membroj (OProf, AProf, PDoc) kaj komitatanoj de la Subtena Sektoro rajtas uzi por sia tiukvalita korespondado leterpaperon de AIS (kun la nomo de la Akademio sur la unua loko), se ili

1) kiel efektivaj membroj indikas sian rangotitolon, fakon, fakaron kaj sekcion aŭ kiel komitatanoj de la Subtena Sektoro indikas sian koncernan rolon, kaj

2) se ĉi tiu personligita leterpapero de AIS krome respektas la preskribojn de art. 4.1.

4.3 En korespondado kun ISKano, al kiu AIS agnoskis sciencistan gradon aŭ rangotitolon, ĉi tiu estu uzata (en mallongigita formo kaj sen troigo kaze de plureco) en la adreso. En la alparolo estu uzata nur unu grado aŭ titolo, prefere sen aldono de la nomo kaj tiam plenskribite sen plipreciziga titolero (do: profesoro, docento, doktoro, magistro, bakalaŭro) aŭ, laŭplaĉe, mallongigite kun sekvanta nomo (do: AProf.Nomo!, Asci.Nomo!, Dr.Nomo!, Bac.Nomo!). Ambaŭkaze eblas sed nur en la dua kazo necesas antaŭmetaĵo (Estimata ..., Altestimata, Kara, ktp.). Seksindikaj aldonaĵoj (sinjoro profesoro; doktorino; ktp.) ne necesas, se tion ne deziras la ricevonto.

4.4 En la buŝa alparolo ankaŭ sufiĉas kaj konvenas ne uzi la nomon sed nur la titolon, sen plipreciziga ero (do: „Profesoro!", „Docento!", „Doktoro!" etc.); eblas krome aldoni la nomon, seksindikon aŭ estimindikon (Kara..., Estimata ...). Inter profesoroj kaj docentoj sufiĉas la alparolo „kolego" kun aŭ sen nomo, estimesprimo aŭ seksindiko. La nuran nomon oni ĉiukaze nur uzu se la alparolato tion nepre deziras, kaj neniam dum oficialaĵoj.

4.5 La rol(=funkci)titolo - (vic)prezidanto, (vic)dekano, senatano, (vic)direktoro - povas anstataŭi en la alparolo rangotitolon aŭ sciencistan gradon.

4.6 La alparolo „moŝto" (kun aŭ sen adjektivo) decas kiel alternativo al la rekomendoj de art. 4.3-4.5 kaze de plenrajtaj membroj de AIS.

Art. 5: Honorkaŭzaj titoloj kaj gradoj

5.1 La rangotitoloj de AIS difinitaj per art. 6 de la statutapendico (OProf, AProf, PDoc, ADoc, ASci, HMdAIS) estas senescepte honorkaŭzaj. Tio signifas, ke la alvoko havigas krom la titolo ja ankaŭ rajtojn kaj devojn sed ne salajron.

5.2 La kondiĉojn por la honorkaŭza agnosko de sciencista grado difinas ĉapitro IX de la ekzamenregularo. La magistreco nur estu honorkaŭze agnoskita, se la meritoj ampleksas pli ol la duoblon de tiuj kiuj legitimigus la gnoskon de honorkaŭza bakalaŭreco. Same la doktoreco nur estu honorkaŭze agnoskita, se la meritoj ampleksas pli ol la duoblon de tiuj, kiuj legitimigus la agnoskon de honorkiala magistreco. Tion oni penu laŭeble pritaksi en la sumoj de la po du komponantoj de la indeco kaj apoginteco (art. 26.2 de la ekzamenregularo), sed ne nepre rilate ĉi tiujn kvar komponantojn de la merito

unuope; ĉi tiuj povas sin parte kompensi, sed je minimuma grado la honorigota devas plenumi ĉiujn kvar kondiĉojn. En kazo de dubo oni orientiĝu laŭ la ĝisnuna tradicio.

5.3 Ekster la regularo pri rajtoj, devoj kaj alvoko de sciencistoj de AIS la Senato rajtas honorkaŭze agnoski la titolojn „docento" kaj „profesoro" (sen antaŭmetita adjektivo) pro elstaraj meritoj, kiuj precipe (kvankam ne nepre) koncernis la agadkampojn de la planitaj arta kaj teknika sektoroj de AIS (sektoroj, kiuj ne realigas studadplanojn kaj ekzamenojn kompareblajn al tiuj de la Scienca Sektoro). La honorigoto devas plenumi la samajn indeckondiĉojn kiel honorigoto per sciencista grado. La meritoj de honorkaŭza docento superu tiujn de honorkaŭza magistro, la meritoj de honorkaŭza profesoro superu tiujn de honorkaŭza doktoro.

Artikolo 6: Aliaj honorigoj

6.1 Kiel honorigo estu rigardata la laŭda mencio de meritoj en parolado okaze de solenaĵo de AIS aŭ en la publikigenda parto de la protokolo de kunsido de la Senato, de la Generala Asembleo, de la Asembleo de la Subtena Sektoro aŭ dum sekcikunveno.

6.2 Por esprimi agnoskon de kaj dankon pro apartaj meritoj mencienda en laŭdado estu kreota honormedalo donebla kaj al indaj apartenantoj kaj al indaj neapartenantoj de AIS.

6.3 Estu kreota konforme al art. 11 de la Statuto premioj por instigi al altnivelaj kontribuoj al la solvo de sciencaj, artaj aŭ teknikaj taskoj, kiuj havas specialan gravecon laŭ la konvinko de la Senato de AIS. Ne rajtas gajni tian premion Senatano aŭ membro de la ĵurio elektita de la Senato.

6.4 La diversaj salonoj en kiuj la sekcioj de AIS okazigas dum SUS aŭ alia studadsesio siajn kursojn kaj konferencojn ricevas la nomojn de elstaraj sciencistoj el tempoepokoj antaŭ la fondo de la Akademio. Tiun ĉi nomon povas anstataŭi la nomo de plenrajta membro mortinta post la preparo de la antaŭa sesio.

6.5 Je taŭga loko en centra konstruaĵo de AIS estu

1) muntitaj honortabuletoj danke al elstaraj meritoj de vivantaj apartenantoj de AIS, kiuj ne estas senatanoj; la tabuletoj restu minimume 10 jarojn post la morto de la tiel honorigito;

2) surlistigitaj la deĵortempoj de la senatoj kune kun la nomoj de la koncernaj senatanoj.

Akceptita de la Senato 1988-03-30/1687pfR

Kolegikunsido de Sekcio 1 dum SUS 4

okazinta vendredon la 4an de septembro 1987/1687pfR, gimnazio de San Marino.

1. (Formalaĵoj) Dekano Muĉic konstatas la ĉeeston de la sekcianoj Clerici, Frank (parte), Lobin, Maxwell, Ouyang, Yashovardhan.
2. (Laborlingvo) La ĉeestantoj sekvas la proponon de la dekano uzi nur la Internacian Lingvon kiel laborlingvon.
3. (Protokolanto) Laŭ propono de la dekano ASci. Lobin protokolas.
4. (Tagordo) La proponita tagordo estas akceptita.
5. (Kunlaboro) Dum la lasta kunsido en aprilo en San Marino OProf.Lansky kaj OProf.Weltner proponis estonte kunlabori kun la Instituto pri Kibernetiko en San Marino. La dekano mencias la jenajn eblecojn realigi ĉi tiun proponon:
- la sekcianoj informos per prelegoj, artikoloj ktp. la instituton pri ilia laboro
- oni realigos kursojn pri diversaj temoj
- oni realigos komunajn esplorojn.

La ĉeestantoj subtenas la proponojn, kvankam ili vidas la problemon de la interkompreniĝlingvo precipe por la realigo de kursoj aŭ prelegoj. La dekano petas la ĉeestantojn pripensi la eblojn de kunlaboro kaj skribe informi lin pri la rezultoj.

6. (Novaj membroj) Laŭ la nova regularo la alvokopropono venu el la fakaroj kaj pluiru al la Senato. La fakaroj proponis la jenajn sciencistojn:

Fakaro 1.1: s-oj Feng (CHN) kaj Sepp (CS)
Fakaro 1.2: s-o Clerici (I)
Fakaro 1.3: s-oj GE Yongliang (CHN) kaj (evt.) Harms (D)
Fakaro 1.4: neniun.
Neniu kontraŭas.

7. (Elekto de la dekano) La ĉeestantoj reelektas OProf.Muĵic (YU) kiel dekanon kaj AProf.Ferretti (RA) kiel vicdekanon.
8. (Diversaĵoj) Por la estontaj SUS la sekcioj prizorgu memstare sian programon kaj proponu ĝin al la prezidanto. Ĉi tiu petas la sekcianojn fari siajn proponojn al la dekano ĝustatempe.

ASci. Lobin — OProf.Muĵic
Protokolanto — Dekano

Kolegikunsido de Sekcio 3 dum SUS 4

okazinta dimanĉon la 30an de aŭgusto 1987/1686pfR, gimnazio de San Marino, 15 - 16 h

1. (Formalaĵoj) Dekano Popovic konstatas la ĉeeston de ankaŭ la efektivaj membroj AProf. Schick kaj AProf. Brĉic-Kostic. Neniu kontestas la decidpovon de la kunsido, ĉar ĝi estas bontempe laŭstatute kunvokita. Oni aprobas la tagordon.
2. (Laborlingvo) Oni konsentas ke sola laborlingvo estu ILo.
3. (Novaj alvokoj) Laŭ la dosiero de la prezidanta sekretariejo kaj laŭ la alvokregularo oni konstatas ke la jam alvokita Firdans F.Ŝukurov plenumas ĉiujn kondiĉojn por esti akceptita kiel AdAIS en sekcio 3. - OProf.Frank el la sekcio 1 esprimis kiel diplomita matematikisto skribe la deziron esti samtempe Adjunkto scienca de Sekcio 3. La kunsido plenkore aprobas tion kaj bonvenigas lin. - La kunsido ne ankoraŭ disponas pri la dokumentoj por profesoro Brody el Kanado, sed laŭ la propono de OProf. Lansky kaj la informoj de OProf.Frank oni povas akcepti lin kiel AProf. en Sekcio 3. La kunsido taskigis la dekanon sekvi la alvokproceduron kaj doni la skriban aprobon post plenumo de ĉiuj formalaj kondiĉoj.
4. (Elektoj) La kunsido konfirmas la nunan dekanon OProf.Popovic kaj post pridiskuto decidas ke vicdekano estas nenecesa pro tre malalta nombro de sekcimembroj. Pro la sama kaŭzo ne utilas dividi la sekcion en fakaroj.
5. (Kromaĵoj) Nenio alia estas diskutenda.

Protokolanto: Dekano OProf. Popovic

Kolegikunsido de Sekcio 4 dum SUS 4

okazinta dimanĉon la 30an de aŭgusto 1987/1686pfR, gimnazio San Marino, 16:00-16:25 h

1. (Formalaĵoj) ADoc.Angstl kiel membro de la dekana triumviraro komisiita konstatas la ĉeeston de ankaŭ ASci. Ariella Colombin kaj ADoc. Romeo Pagliarani. Ĉiuj ĉeestantoj havas voĉdonrajton. La tagordo estas akceptita.
2. (Laborlingvoj) Sola laborlingvo estu ILo.
3. (Novaj alvokoj) La ĉeestantoj proponas alvoki Ronald J.Glossop, Usono, kiel asociita profesoro. La ĉeestantoj proponas la rangoplialtigon de la alvokita ASci. Eugene de Zilah, Metz (F) al AProf. kaj la alvokon de OProf.Helmar Frank kiel ADoc. al Sekcio 4. - La diskuton de la aliaj alvokpetoj oni prokrastas al la venonta kunsido.
4. (Elektoj) Pro la neĉeesto de du el la dekana triumviraro komisiita, konfirmo aŭ nova elekto de dekano ne okazas. Oni konsentas, ne jam diskuti aŭ decidi pri fakarestroj pro tro malalta nombro de ĝisnunaj sekcianoj.
5. (Kromaĵoj) La ĉeestantoj proponas, ke oni invitu s-ron Evaldo Pauli, Brazilo, sendi informojn por alvokiĝo.

(Daŭrigo la 2-an de septembro, 21:00; 21:15 h) AProf.Werner Strombach ekpartoprenas kiel kvara sekciano kaj aprobas la ĝisnunajn proponojn. Revenante al la TOP 3 la ĉeestantoj proponas la alvokon de s-ro Joseph Major MA el Novzelando kiel ASci. Oni prokrastas la diskuton pri la alvoko de d-ro Roland Pietz, Stuttgart (D), kiu estu petata doni informojn pri la temo de sia instrukomisiiĝo.

Protokolanto: ADoc.Helmut Angstl
Membro de la dekana triumviraro komisiita

Kolegikunsido de Sekcio 5 dum SUS 4

okazinta dimanĉon, la 30an de aŭgusto 1987

(...)

(Alvokoj kaj rangoplialtigoj) La plenrajtaj docentoj de Smet, Maitzen, Roux kaj Sachs laŭ konstato de la sekcio plenumas la kondiĉojn fariĝi asociitaj profesoroj, eventuale post realigo de SUS-kurso.

(...)

Protokolis: OProf.Neergaard, dekano

Eksterlandaj AIS-kursoj

La provizora „Regularo pri la instruado kaj la studado ĉe AIS" (vd. GrKG/Humankybernetik 28/4, p. 186) antaŭvidas per art. 7.2 kursojn kaj lekciseriojn de AIS ankaŭ ekster San Marino. La unuaj „sesioj" kun po (minimume) 3 tiaj kursoj okazis en Paderborn (D) kaj Krynica (PL).

Dum unua Paderborna studadsesio lekciis de la 25a ĝis la 27a de marto ADoc. Weeser-Krell (germane), OProf.Pennacchietti (en ILo) kaj AProf.Schick (en ILo). Unuopa kurso sekvis 1988-05-07 de OProf.Muzic (en ILo).

Universitatan Sesion pri Morfosciencoj okazigis en Krynica de la 2-a ĝis la 8-a de majo 1988, por la morfoscienca sekcio PDoc. T.Tyblewski per kursoj de ADoc.Michel DucGoninaz dr. (kune kun PDoc. Tyblewski dr.) kaj de AProf.Hristo Marinov dr.; pro malsano kurso de AProf. Vrancic dr. ne povis okazi. 26 de la 42 partoprenantoj ekzameniĝis. ASci.J.Leyk dr. , Destina Tyblewska-Kundzicz mag. kaj Marek Siurawski prelegis, Slawomir Ruszkiewicz kontribuis per komentario sur vidobendo.

Offizielle Bekanntmachung

Publikaĵoj de - haveblaj ĉe - AIS: Veröffentlichungen der - beziehbar durch die - AIS:

Ekesto kaj celoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, 120 p., tekstoj parte ankaŭ itale, germane, france kaj angle (komp.: B. Frank-Böhringer)	0,15 AKU*
H. Frank: Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva/ Vorkurs zur Prospektiven Bildunsgwissenschaft, 126 p.	0,18 AKU
H. Frank: Propedeŭtiko ......, en ILo kun ĉina traduko	0,12 AKU
V. Weiss, S. Lehrl, H. Frank: Psychogentik der Intelligenz (Psikogenetiko de la Inteligenteco, 224 p., plejgrandparte en la Germana	0,18 AKU
Kibernetiko de la homa lingvo (Kybernetik der menschlichen Sprache) komp. kun germanaj resumoj, Frank/Yashovardhan/Czlske, 192 p.	0,10 AKU
Lingvokibernetiko / Sprachkybernetik, 190 p. (komp. Frank/Yashovardhan/Frank-Böhringer)	0,18 AKU
Klerigscienco Prospektiva (Enkonduko en la Psikostrukturteorion) taskaro / Prospektive Bildungswissenschaft (Einführung in die Psychostrukturtheorie) Aufgaben	0,15 AKU
B.Clauzade, C.Roux: Likenoj en Okcidenta Eŭropo, 893 p., kun franca, angla kaj germana traduko de la plej oftaj vortoj.	1,50 AKU
H.Behrmann / Sp. Stimeč (komp.): Bildung und Berechnung (Klerigo kaj Prikalkulado), 134 p., ĉefe en ILo.	0,17 AKU
T.Carlevaro / G.Lobin (komp.): Einführung in die Interlinguistik (Enkonduko en la Interlingvistikon), 263 p., ĉefe en ILo.	0,30 AKU
Wörterbuch der Internationalen Sprache (Vortaro de la Internacia Lingvo) ILo/deutsch - deutsch/ILo), eldonita de Eŭropa Klubo, 146p.	0,15 AKU
Hilgers/Yashovardhan: EG-Wörterbuch Mathematischer Begriffe (EK-vortaro de matematikaj terminoj)	0,18 AKU
H. Frank, B.S. Meder: Einführung in die kybernetische Pädagogik (germane)	0,15 AKU
B.S. Meder/W. Schmid (komp.): Quellentexte zur kybernetischen Pädagogik (5 volumoj, binditaj, entute 3531 p., 41 aŭtoroj, plej grandparte en la Germana, parte en la Angla, Franca, Hispana, Portugala, Itala, Rusa, Ĉeha, Kroata, Rumana)	0,40 AKU
Unopaj regularoj de AIS, inkluzive sendkostojn (ĝis 1988-12-31: po 2 internaciaj respondkuponoj aŭ)	0,04 AKU
momente estas haveblaj: Statuto de AIS kun apendico - Regularo pri alvokoj, devoj kaj rajtoj de AIS-apartenantoj - Regularo pri instruado kaj studado ĉe AIS, kune kun la Kunaldregularo - Regularo pri kotizoj kaj mastrumado - vorläufige vereinheitlichte Prüfungsordnung	
J.L. Ferretti: La Fosfokalcia Metabolo laŭ elementa kibernetika vidpunkto (kun tradukoj en la Anglan kaj Hispanan)	(Aperonta)
Videobendo (VHS) ILo por Sciencistoj Leciono 1 - 3	0,45 AKU
La kompletan, sed ne programitan kurson, Lecionoj 1 - 6 ofertas B. Höcker, Klöcknerstr.13, D-4790 Paderborn, Tel.: 0049-/0-5251-37762 (la pakaĵo enhavas la kurson kun didaktika legaĵo)	1,10 AKU
Prelegoj sur videobendoj: Frank: Ĉu la inteligento estas mezurebla, ĉu heredebla? VHS ILo kun germana traduko sur du ŝpuroj, aŭ laŭdezire nur ILo	0,30 AKU
Frank: La propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo VHS ILo kun germana traduko sur du ŝpuroj, aŭ laŭdezire nur ILo	0,30 AKU
Ambaŭ prelegoj sur unu kasedo:	0,40 AKU
Diskedoj, 5 1/4 colojn kun la ISK-dokumentaro kaj serĉadprogramo por IBM-kongruaj komputiloj ; 2 aktualigoj dum 2 jaroj senpage	0,30 AKU

Bonvulu sendi kune kun la mendo la ĝustan monsumon (eŭroĉeke aŭ ĝire sed kun aldono de la bankkostoj). Al la libroprezoj estas aldonendaj la sendkostoj: po libro 0,01 AKU,por ĉiu libro aŭ videobendo. Revendistoj, t.e. personoj kiuj samtempe mendas minimume 5 ekzemplerojn, pagas la prezon de 4 ekzempleroj, ne pagas sendokostojn kaj ricevas la 5an ekzempleron senpage.

* Momente unu AKU egalvaloras al 100 DM aŭ al 73.000 LIT.

Bonvulu nur uzi la jenan konton por eventuala ĝirado: Postgirokonto Hannover (BLZ 250 100 30) 2051305, Akademio Internacia de la Sciencoj

Außerhalb der redaktionellen Verantwortung

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". – Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. – En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). – Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". – En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 –1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". – Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.